Jaro VI. Oktobro, 1924. Numero 2.

BULGARA ESPERANTISTO

ABONPAGO: por Bulgarlando 30 levoj. por fremdlando 50 levoj (0·75 Sm.)	MONATA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA SOCIETO	АБОНАМЕНТЪ: за България 30 лв. Обявления: кв. см. 2 лева. Отдѣленъ брой 3·50 лева

Препоржчано отъ М-о Н. Пр. за учил. библ. съ окр. № 1870 отъ 27. I. 1922

Нашиятъ зовъ.

Мощенъ зовъ се носи
по земята...

Вие, които сте почувствували нужда да се сношавате съ чужденци и сте видѣли неудобството отъ многоезичието;

Вие, които сте изпадали въ положението да стоите предъ хора, надарени като васъ отъ естеството съ човѣшка речь, и все пакъ да не можете да размѣните нито една мисълъ съ тѣхъ, защото езицитѣ ви сж свързани отъ това многоезичие;

Вие, представители на производството, творци на материални блага, които събирате отъ десетки страни на земното кълбо сурови материи, за да ги преработите въ модерни днешни потрѣби;

Вие, които разнасяте произведенитѣ отъ разнитѣ народи блага по цѣлъ свѣтъ, и въ чиито магазини е събранъ труда на най-далечни народи;

Вие, които се стремите да надникнете задъ границитѣ на своето отечество и да видите чуждия животъ и чуждата култура;

Nia voko.

Tra la mondo iras
forta voko...

Vi, kiuj eksentis bezonon komunikiĝi kun fremduloj kaj spertis la neoportunecon de la multlingveco;

Vi, kiuj enfalis en situacion stari antaŭ homoj, dotitaj kiel vi de la naturo per homa parolpovo, kaj tamen ne povi interŝanĝi eĉ unu penson kun ili, ĉar viaj langoj estas ligitaj pro tiu ĉi multlingveco;

Vi, reprezentantoj de la produktado, kreantoj de materialaj bonoj, kiuj kolektas el dekoj da landoj de la terglobo krudajn materiojn, por relabori ilin en modernajn nunajn aplikaĵojn,

Vi, kiuj disportas la produktitajn de diversaj popoloj bonojn en la tuta mondo, kaj en kies magazenoj estas kolektita la laboraĵo de plej malproksimaj popoloj;

Vi, kiuj celadas rigardi trans la limojn de via patrolando kaj vidi la fremdan vivon kaj la fremdan kulturon;

Вие, които, подтиквани отъ копнежа на идеалиста, желаете да вземете дѣлъ въ общия международенъ животъ и да усѣтите неговия лъхъ;

Vi, kiuj, akcelate de la sopiro de idealisto, deziras preni parton en la komuna internacia vivo kaj eksenti ĝian alblovon;

Вие, които схващате, че еволюционниятъ процесъ, който събра индивидитѣ въ семейства, въ родове, въ племена и народи, ще продължи неминуемо, като изглажда недоразуменията между отдѣлнитѣ народи, докато стигне до единъ съюзъ на народитѣ — едно човѣчество, което съзнава преди всичко интереситѣ на общото —

Vi, kiuj komprenas, ke la evolua proceso, kiu kunigis la individuojn en familiojn, en familigrupojn, en gentojn kaj popolojn, daŭros nepre, forigonte la miskomprenojn inter la apartaj popoloj, ĝis kiam ĝi atingos al unu ligo de la popoloj — unu homaro, kiu konscias antaŭ ĉio la interesojn komunajn —

васъ всички зовемъ ние, есперантиститѣ:

vin ĉiujn vokas ni, la esperantistoj:

Елате при насъ. Приемете есперанто и помогнете да премахнемъ канарата на многоезичието, която заприщва прѣкия пжть на човѣшкия напредъкъ. До днесъ вие всички сте били принудени да заобикаляте тая канара и по неудобни пжтеки да стигате до международнитѣ сношения, които сж основата на живота на днешнитѣ народи.

Venu al ni. Akceptu esperanton kaj helpu al ni formovi la rokon de la multlingveco, kiu baras la rektan vojon de la homa progreso. Ĝis nun vi ĉiuj estis devigataj ĉirkaŭiri tiun rokon kaj tra neoportunaj vojetoj venadi al la internaciaj komunikoj, kiuj estas la bazo de la vivo de l'nunaj popoloj.

Помогнете да я премахнемъ, за да откриемъ широко пжтя на мирния напредъкъ, за благото на човѣчеството.

Helpu al ni forigi ĝin, por malkovri larĝe la vojon de la paca progresado, por la bono de la homaro.

Л. Л. Заменхофъ.

Пжтьтъ

(La Vojo).

Въ нощьта непрогледна звездата свѣтлѣе,
що гонимъ до самозабрава —
звездата свѣтлѣе, свѣтлика си лѣе
и пжтя ни тя озарява!
И въ мрака не плашатъ ни призраци гнѣвни,
ни присмѣхи хорски, бедитѣ вседневни,
че пжтьтъ ни, ясенъ и свѣтълъ, извежда
на свиденъ брѣгъ — свидна надежда!

Напредъ да вървимъ къмъ звездата далека,
прокарвайки пѫть въ канаритѣ!
И мъничка капчица лека-полека
пробива балкана гранитенъ.
Надежда, упорство, велико *търпение* —
подъ тѣхния знакъ ще вървимъ съ пѣснопѣния,
и стѫпка по стѫпка, следъ трудъ многолѣтенъ
ще стигнемъ блѣна си заветенъ!

Ний сѣемъ и сѣемъ съ растяща отрада,
къмъ новъ свѣтъ извили очитѣ;
сто кълна пропадатъ, хиляда пропадатъ —
ний сѣемъ и сѣемъ въ браздитѣ.
„Хей, спри се!" презъ смѣхъ ни тамъ нѣкой подвиква.
„Не спирай! Не спирай!" — сърцето откликва:
„Напредъ и напредъ! Победите ли — слава
нетленна ви чака тогава!"

А дълга ли суша, ил' буря внезапна
слети дърветата съ мощь дива —
какво? Листица залинѣли откапнатъ,
по-прѣсенъ сокъ клоне налива!
Другаритѣ храбри въ борбата нещадна
не ще се отчаятъ, не ще да пропаднатъ —
тѣ крачатъ напредъ упорити, калени,
отъ свѣтли мечти окрилени!

Надежда, упорство, велико *търпение* —
подъ тѣхния знакъ ще вървимъ съ пѣснопѣния,
и стѫпка по стѫпка, следъ трудъ многолѣтенъ
ще стигнемъ блѣна си заветенъ!
И ние вървимъ къмъ звездата далека,
прокарваме пѫть въ канаритѣ!
И мъничка капчица лека-полека
пробива балкана гранитенъ!

Превелъ *Ив. Добревъ.*

Al la lando de la amo.

Verda stelo, stel' brilanta nin allogas — pilgrimantaj
al la bela hela lando de la paco kaj la am'.
Alte, alte sur ĉielo, vojon montras tra malhelo
la profeta verda stelo per la esperiga flam'.

Ja, la lando estas fore, sed senlace kaj fervore
marŝas ni, ĉar en la koroj fortojn donas la esper'.
Kaj el ĉiuj terangulo, jen ekiras tra nebuloj
niaj fratoj samsortuloj al la promesita ter'.

Ni malmultaj estas, tamen ni esperas, kredas flame
ke ne estingiĝos jame la fajrero en la kor'.
Ĝoje batas nia kor' ĉar niaj ardaj verdaj torĉoj
al la lando bela sorĉa, helradiojn sendas for.

Sed subite jen ekestas, fulmotondroj kaj tempestoj,
multaj falas, multaj restas al la sanga mort' viktim'.
Sed ne ĉesas nia iro, ĉar ni scias: pro martiroj
la reviton ni akiros', — kaj ekiras ni sen tim'.

Kaj post longa migro, vago, ni alvenos dum heltago,
kaj ekflirtos verdaj flagoj sur la atingita ter'.
Ni disrompos la armilojn, sabrojn kaj ponardojn brilajn,
kaj elforĝos ni plugilojn el la sanggutanta fer'.

For de l'jugo, kaj de l'valoj de la Mort', de l' sangbataloj,
ĉiuj estas ni egalaj — filoj de l'Libero jam.
Kaj ni genufleksos tie, kaj eksonos preĝo nia
al la sola reĝo-Dio, al la frata vera Am'.

Sofia, 1924. *Zahari K. Zahariev.*

EL „SONĜO PRI FELIĈO“ DE PENĈO SLAVEJKOV.

1. Nek ekbloveto super kampoj,
nek trem' en arba foliar'.
Spegulas sin ĉiela klaro
el gutoj rosaj sur la mar'.

Fruhore ekirinte, spiras
mi la freŝecon de l'maten' —
karesas la animon revo
pri plenfacila hejmreven'.

Pri voj' facila, pri ripozo
en hejmangul' dum vesperiĝ',
min kie por kares' atendas
la sonĝ' de mia la feliĉ'.

4. Ploris nokt' maldolĉe sen konsol',
ploris ĝi silente en la sol', —
ĝin ke blanka tago ne atentas,
kaj ne volas scii kion sentas,
kio ĝin turmentas en la kor',
kia malheligas ĝin dolor'! . . .

Kiam venis ree la mateno —
per la larmoj de la noktĉagreno
estis roskovrita tuta ter';
kaj en ĉiu larma gut'-roser'
sin spegulis blanka tag' lumanta, —
kaj senzorge pasis for ridanta.

5. Kontraŭe, kie krute kurbas ia
vojeto sur la basko de la monto,
sub ombro de prunarb' malhelfolia
belsone ŝprucas malvarmeta fonto.

La herb' ensole velkas kaj envie
al ĉiu vojaĝanto ĝi almozas,
kaj flustras la fontet': ĉe mi ĉi tie
mirinde, dolĉe oni ja ripozas!

12. Super vasta la kamparo
regas paco kaj silent',
dormas laca grena maro,
ne lulata de la vent'.

Tremas la varmeg' senlima
en aer' — flugila flam', —
pri rikolto la proksima
al grenkampoj flustras jam.

13. De la konvalo sur la folietoj
naskitaj dum maten' du rosgutetoj
per la radioj estis de la sun'
lumitaj — ili unuiĝis nun.

Ĉu kiel du gutetoj tiel same
ne unuiĝis niaj koroj ame?

Ĉu vi memoras? — en la helmaten'
amsuno kiam brilis en seren'.

Varna. Trad. *Miti.*

За да се разпространи нашето списание въ чужбина, достатъчно е всѣки български есперантистъ да купи по единъ екземпляръ отъ настоящия брой и да го прати даромъ на нѣкой свой чуждестраненъ кореспондентъ, или на който и да е намеренъ адресъ на есперантистъ въ странство.

Нека всички сторимъ това, за да засилимъ нашето списание и да го видимъ скоро уголѣмено.

Sulamito.

Rajdis mi sur ĉeval' al la fajra batal',
kie mortis sennombraj truparoj.
Sed min regis seren' kaj en blua maten'
gaje flirtis en vent' miaj haroj.

Kaj per forta hufbat' la ĉeval' sen kompat'
malamikojn forpelis balae.
Kun terura sonor', kvazaŭ mura trabor'
tondris ĉio ĥaose ĉirkaŭe.

Sed ne vidis okul' ruĝon fajran de brul',
nek atingis ve-krioj orelon.
Mi triumfe, sen brid', rajdis kun venka rid'
ĉiam plu, ĉiam plu sen ŝancelo.

Ho moment' de malglor'! Sanga plor' de la kor'—
ne rompinta la sabron, la pintan.
Jen trafajfis la sag' — kaj en mia briltag'
trafis min, en senforto falintan.

Kial venis vi, am', por bruligi per flam'
via ĉion-cindriga — venkiton?
Estis mia vi sort' — estis mia vi mort',
estis vi — estis vi — Sulamito!

*

Ploro de la kondamnito
eĥas tra la nokt' glacia.
Sulamito, Sulamito,
kial fajras koro via?

Ĝemo lasta en la vasta
spaco malaperas ien.
Vento brua al la trua
for' stertoras agonie.

Sur kadavron de venkito
nokto falis frostglacie.
Sulamito, Sulamito,
kial ploras koro via?

*

Nokto pasis; de l'animo la dolor' ebria
jam mildiĝis — kunfandiĝis en la tag' radio.
Ja ne lasis am' senlima en animo la doloron
kaj malhelan noktmantelon amo prenis for de l'koro.

Kvazaŭ nur amare-dolĉa sonĝo ŝarĝas la memoron
kaj en ia rondo sorĉa dancas nur ankoraŭ koro.
De l'tempestoj pasis tempo: krevas nun printempo!
Kaj en ama fajro flama svenas kora sento.

*

Sorĉa par':
maja car'
kun carino — lunfeino.

Dia vojo!
Ĉiu ĝoju!
Ĉiu koro kunsonoru
kun la gaja, maja tril'
ĉie, kie
procesie
pasas ama veturil'.
De la griloj mildaj triloj
kaj ĥoral' de najtingal'.

Krona rano,
en la mano
kun la torĉo, ĉaron sorĉan
akompanu.

Dancas svate la muŝfratoj
ĉirkaŭ ĉar' de l'festa par'.
Kantas ĥor'.
Sankta hor'!

Ja aŭdita ŝia preĝo
antaŭ la ĉiela reĝo:
Jen atest' — la gaja fest'.
Nun ekvidu:—
Sulamito
estas la reĝin' fabela
kaj mi — ŝia sklav' fidela.

*

Sed ve! ne realis la sorĉa fabelo
kaj min ne regalis per kisoj la belo
kaj estas ĝi for —
la am' de la kor',
kaj estis nur sonĝ' Sulamito
de l'sorto perfida!

Kaj tamen — malplenas dolore la koro
kaj ĉiam revenas malĝoja memoro
pri l'stranga virin'...
Ho, stranga destin' —
nur revi pri vi, Sulamito,
en vivo sorĉita.

Kaj restas mi sola kun mia malĝojo
vagul' senkonsola, malgaja, senvoja
kun vana esper'
revidi sur ter'
vin, bela kimer' Sulamito —
porĉiam perdita

Sofia. *Asen Grigorov.*

La esperantisto.

Fine mi aĉetis verdan stelon, metis ĝin en la butontruon, kaj mi estis jam esperantisto. Ĝi bele ornamis mian bruston kaj per sia verda brilo ĝi kvazaŭ diradis, anstataŭ mi, al la preterpasantaj homoj: „Mi estas esperantisto".

Foje mi vizitis esperanto-kunvenon. Tie estis kolektiĝintaj multaj verdsteluloj. Ili babilis, parolis, ŝercis, ridis, kaj ĉiam en esperanto. Poste ili seriozîĝis. Iu parolis pri ia interna ideo, sed mi komprenis nenion. Eĉ sen interna ideo oni povas esti esperantisto. Ĉu mi ne parolas esperanton? Tio sufiĉas. Do mi ankaŭ estas esperantisto.

La kunveno estis finita. Ĉiuj disiris en la urbo, okupiĝinte pri siaj privataj ĉiutagaj aferoj. Ankaŭ mi. La esperantistoj tre ekplaĉis al mi. Sed nenio, krom la lingvo, ligis min kun ili.

Iutage mi eliris promene ekster la urbo. Kaj tie sur la polvoplena vojo mi renkontis homon. Li marŝis al la urbo. Vestita per simpla, malriĉa vestaĵo, nudpieda, kun saketo sur la ŝultro, li havis aspekton de fremdulo. Mi sufiĉe bone rimarkis ankaŭ sur lia brusto la brilon de verda stelo. Ho, li estas samideano, mi diris pense, kaj mi alparolis lin:

— Bonan tagon, sinjoro!

— Bonan tagon, kara frato.

— Kiu vi estas, nekonata fremdulo, kaj kiel vi estas nomata?

— Mi estas homo, kaj mia nomo estas Liberulo.

Mi ne estis kontenta de lia respondo kaj mi demandis plue:

— Sed al kiu nacio vi apartenas?

— Mi estas terano.

— Terano? Ja, tia nacio ne ekzistas.

— Kial ne? Ĉu la tero ne estas nia patrino kaj ni ĝiaj idoj?

— Jes, sed . . . kia estas via religio?

— Homa, respondis li.

Mi ne komprenis. Tian religion ĝis nun mi ne konis. Eble laŭ la nomo de lia Dio mi ekscios lian religion.

— Kiel estas nomata via Dio?

— Amo, kaj mia Dio estas en mia koro.

„Stranga homo", ekpensis mi, — „eble li estas freneza. Mi komprenos".

— Sed ĉu vi ne timas iri sola, ĉi tie en nekonata lando, inter nekonataj homoj? Eble oni mortigos kaj prirabos vin.

— Ne, mi ne timas, ĉar ĉiuj homoj estas miaj fratoj. La lando ne estas nekonata al mi, ĉar la tuta tero estas homa hejmo. Al la malriĉuloj, al la bezonantoj mi volonte donos ĉion, kion mi havas. Se oni mortigos min, oni trovos en mi nur mian koron, kaj en ĝi mian amon.

— Gardu vin, fremdulo, ĉi-tie oni malamas la fremdulojn.

— Sed mi amas onin. Kiu estas pli forta?

Mi ne povis respondi, pro tio mi ŝanĝis la demandon:

— Sed pro kio vi estas veninta ĉi-tien, — eble por almozpeti? Vi estas tre malriĉa.

— Ho ne, mi estas sufiĉe sana por perlabori mian panon. Mi ne estas malriĉa, ĉar mi estas sana kaj sata.

— Sed vi ne havas monon.

— Mi ne bezonas ĝin, pro tio mi ne havas.

— Sed kion vi faras kun la mono, kiun vi laborgajnas?

— Mi aĉetas nur panon, kaj la reston de la mono mi disdonas al malsanuloj, al maljunuloj, do, al miaj fratoj, kiuj ne povas labori.

— Sed kial vi marŝas nudpiede? Aĉetu ŝuojn. Ja estas honte iri tiel.

— Mi donis miajn ŝuojn al malriĉulo, kies piedoj estis vunditaj. Sed miaj — estas sanaj. Do, mi povas iri nudpiede. Ŝuojn mi ne aĉetos, kaj la monon mi uzos por aĉeti panon por la malsatantoj. Honte estas porti superfluan vestaĵon, kiam aliaj eĉ bezonatan ne havas.

Mi eksilentis. Li kroĉis malgrandan saketon al la rando de sia bastono, kaj metinte ĝin sur sia ŝultro li ekiris.

— Adiaŭ, kara frato.

— Adiaŭ, mi diris apenaŭ.

Nudpieda, vestita per simpla, malriĉa vestaĵo, li malproksimiĝadis sur la polvoplena vojo. Longe, longe mi rigardis post li. Mi enpensiĝis. Ne, ne, li ne estas freneza. Li estas homo. Li estas esperantisto. Kia granda diferenco estas inter li kaj mi! Mi ekhontis. Timeme mi eligis mian verdan stelon el mia butontruo kaj mi metis ĝin en la poŝon.

Kaj mi libere elspiris.

Nun mi komprenis la internan ideon. Ne mi, ne: li, li estas la esperantisto.

Sofia. *Zah. Zahariev.*

La malamiko de progresado.

Mi estas pli forta, ol ĉiuj armeoj en la mondo kune kaj entute.

Mi pereigis pli da animoj, ol la militoj de ĉiuj nacioj.

Mi estas pli mortiga, ol la kugloj de ĉiuj nacioj, kaj mi detruis pli da hejmoj, ol la plej kolosaj kanonoj.

Неприятельтъ на напредъка.

Азъ съмъ по-силенъ отъ всички армии на свѣта, заедно и вкупомъ.

Азъ съмъ погубилъ повече души, отколкото войнитѣ на всички народи.

Азъ съмъ по-смъртоносенъ отъ куршумитѣ на всички народи и съмъ разрушилъ повече домове отъ най-грамаднитѣ топове.

Mi trovas miajn viktimojn inter riĉuloj kaj malriĉuloj, inter junuloj kaj maljunuloj, inter simplaj homoj kaj kleruloj. Mi malhelpas la sukceson de ĉiu proponata projekto kaj ĉiu prezentata metodo.

Mi estas ĉie — en la hejmo, laborejo, sur la strato, sur la maro, kaj eĉ en la preĝejo. Mi kaŭzas spiritan pereon, malnobligon kaj morton, kaj tamen malmultaj provas eviti min. Mi insidas el kaŝitaj lokoj kaj faras la plimulton da mia laboro sekrete. Mi ofte estas ĉe via pordo kaj ofte revenas. Mi estas nedecidema. Mi estas via plej malbona malamiko.

Kiu mi estas?
— Mi estas la *indiferenteco.*

(Tradukita el germana originalo).

Азъ намирамъ своитѣ жертви между богати и сиромаси, между млади и стари, между прости хора и просвѣтени. Азъ преча на успѣха на всѣки предлаганъ проектъ и всѣки представянъ методъ.

Азъ съмъ навредъ: у дома, въ работилницата, на улицата, по морето, дори и въ черквата. Азъ докарвамъ духовна гибель, оподляване и смърть, и все пакъ малцина се опитватъ да ме отбегнатъ. Азъ действувамъ отъ засада отъ скрити мѣста и правя повечето отъ работата си тайно. Азъ често съмъ на вратата ви и често се връщамъ. Азъ съмъ нерешителенъ. Азъ съмъ вашиятъ най-лошъ неприятель.

Кой съмъ азъ?
— Азъ съмъ *индиферентностьта.*

LA INTERNACIA VIVO KAJ LA NACIA SENTO.

(Enkondukaj vortoj en la referaĵo de At. D. Atanasov pri la bogomilismo, legita en kunvenoj de la Sofiaj esperantistoj la 10-an kaj la 24-an de oktobro, 1924).

Tre ofte ni, la esperantistoj, en nia internacia vivo, en niaj rilatoj kun fremduloj, falas en la situacion de patro Paisij: serĉi ion valoran, ŝatindan en nia nacio kaj en nia historio, por prezenti ĝin al la fremdaj samideanoj. Niaj korespondantoj ofte interesiĝas pri nia popolo kaj ĝia pasinteco; ili rakontas en siaj leteroj pri siaj popoloj kaj demandas de ni informojn pri la nia. Sed kiel ni povus doni informojn, se ni mem ne konus ilin? Tiamaniere en

МЕЖДУНАРОДНИЯТЪ ЖИВОТЪ И НАЦИОНАЛНОТО ЧУВСТВО.

(Встѫпителни думи въ реферата на Ат. Д. Атанасовъ за богомилството, четенъ въ събрания на софийскитѣ есперантисти на 10 и на 24 октомврий 1924).

Твърде често ние, есперантиститѣ, въ своя международенъ животъ, въ своитѣ сношения съ чужденци, изпадаме въ положението на отца Паисия: да търсимъ нѣщо ценно, хубаво въ своята нация и въ своята история, за да го представимъ на чуждитѣ си съидейници. Нашитѣ кореспонденти често се интересуватъ отъ нашия народъ и неговото минало; тѣ разказватъ въ писмата си за своитѣ народи и ни искатъ

multaj okazoj tiu komunikiĝado kun fremduloj instigas nin pristudi pli detale nian propran popolon, nian propran historion. Dank' al tiu vivo ni komencas pensi, kio do valora estas en nia popolo kaj en ĝia pasinteco, per kio ni povus prezenti nin inde al la fremduloj. Ni komencas *taksi* la faktojn en nia historio, analizi ilin kritike, ĉar nur kiam ni mem komprenas ilin bone, ni povos klarigi ilin al fremduloj.

Kaj jen aperas io, kio eksonus kiel paradokso en la oreloj de la ŝovinistoj, kiuj vidas en la internacia vivo grandan danĝeron por la nacieco kaj por la patriotismo:

per esperanto kaj pro nia internacia vivo ni estas akcelataj al memekkono kiel nacio.

сведения за нашия. Но какъ бихме могли ние да дадемъ сведения, ако сами не ги знаемъ? По такъвъ начинъ това сношаване съ чужденци ни заставя да проучваме по-обстойно своя собственъ народъ, своята собствена история. Благодарение на този животъ ние започваме да мислимъ, какво ценно има въ нашия народъ и въ неговото минало, съ което ние бихме могли да се представимъ достойно предъ чужденцитѣ. Ние започваме да *преценяваме* фактитѣ въ нашата история, да ги анализираме критически, защото само когато самитѣ ние ги разбираме добре, бихме могли да ги обясняваме на чужденцитѣ.

И ето явява се нѣщо, което би зазвучало като парадоксъ въ ушитѣ на шовиниститѣ, които виждатъ въ международния животъ голѣма опасность за народностьта и за патриотизъма:

чрезъ есперанто и поради нашия международенъ животъ ние биваме подтиквани къмъ самопознание като нация.

Идейната страна на есперантското движение.*)

Всѣко по-широко обществено течение, което дава нѣщо ново въ историята на човѣчеството, има не само теоритическа, суха, научна страна, а и друга една, която засѣга чувствата и подтиква волята на маситѣ, и която азъ ще нарека *емоционална страна на движението*. Християнство, социални идеи и пр. — всички обществени движения сж увличали маситѣ и сж правѣли отъ тѣхъ една ревностна армия въ бор-

*) Това е една часть отъ сказката, държана отъ Ат. Д. Атанасовъ на 24 февруарий 1924 год. въ университета, аудитория № 45, по случай пропагандната зелена седмица. Първата часть на сказката представя сжщностьта на есперантското движение като движение да се прокара въ живота една културна придобивка съ голѣмо практическо значение.

бата за ново дѣло не тъкмо съ сухи теоритични разсѫждения, а съ емоционалната си страна. Тежко на движение, въ което нѣма този елементъ, а което се основава и спира само на теории. Тежко на движение, което не може да има свой химнъ, свои пѣсни, своя литература! То никога не ще обедини маси и не ще хване коренъ въ живота.

Азъ зная, че мнозина се страхуватъ отъ тази страна на едно движение и предпочитатъ да не се ангажиратъ съ нея. Работата е тамъ, че тя, като е силата на движението, сѫщевременно е и най-уязвимата му страна. Намиратъ се отдѣлни екзалтирани единици, които прекаляватъ съ емоционалния елементъ, не знаятъ мѣра въ своята възторженость и често я изказватъ безъ тактъ; това вече представя цѣлото дѣло въ комиченъ видъ и прокужда малодушнитѣ, които не могатъ да преценятъ, че туй е проява на единици и то не ангажира цѣлото движение. Въ всѣки случай хората съ самостоятеленъ умъ не се плашатъ отъ такива прояви и не бѣгатъ отъ дѣлото заради крайноститѣ на отдѣлни личности, а оставатъ въ движението и се стараятъ отвѫтре да премахнатъ този недѫгъ.

Все пакъ, емоционалната страна на всѣко обществено движение сѫществува, тя представлява една сила, която въ никой случай не бива да се игнорира или подценява.

Тази страна обикновено се основава на туй, че конкретната цель на движението се свързва съ една по-обща хуманитарна идея.

И есперантското движение не е лишено отъ своята емоционална страна — и тя е доста силна. Безъ нея сигурно есперанто не би билъ днесъ това, което е.

Първитѣ последователи на Заменхофа не сѫ имали никакви материялни облаги отъ есперанто. Напротивъ, тѣ сѫ жертвували пари, време, трудъ, за да го пропагандиратъ. Защо? — Защото сѫ знаели, че есперанто може да принесе добро и само добро на човѣчеството. Есперантското движение е свързано съ една идея, която, както и есперанто, не е нѣщо случайно, произволно, изникнало само по желанието на единъ кабинетенъ доброжелатель на човѣчеството. Не, тя се корени дълбоко въ историята и намира проявление въ всички по-висши философски системи и въ всички по-широки обществени течения. Тази идея е: **човѣкъ** *преди всичко е* **човѣкъ** *и е ценень като* **човѣкъ**, *а не като българинъ, немецъ, французинъ и пр.* Хората сѫ създадени да си помагатъ взаимно, да живѣятъ въ миръ, да творятъ куптура, а не да се ядатъ, потискатъ и избиватъ помежду си. Всѣки човѣкъ трѣбва да знае, че вънъ отъ границитѣ на неговото отечество живѣятъ сѫщо хора, а не демони. Той трѣбва да знае, че и тамъ сълзитѣ на майката сѫ свещени сълзи, и тамъ бащата гледа на своята рожба съ сѫщия дълбокъ неженъ погледъ, като бащитѣ въ собствената му страна, и

поема като тѣхъ тежкия кръстъ на живота съ готовность, отъ обичь къмъ децата си. И тамъ хората плачатъ и се смѣятъ, страдатъ и се радватъ сѫщо като у неговия народъ.

Тази идея е стара, много по-стара отъ есперанто, тя е била повтаряна хиляди години — но тя е била повечето *книжна*, *теоритична* идея, и мнозина, които сѫ я изповѣдвали, въ сѫщность не сѫ живѣли съ нея.

Есперанто, като даде възможность на всѣки човѣкъ да участвува въ международния животъ и да се опознае съ хора отъ другитѣ народи, даде плъть и кръвь на тази идея, и тя вече е нѣщо реално, нѣщо, което живѣе.

Тя именно е основата на емоционалната страна на есперантското движение, тя е пружината на това движение, тя изпълня пѣснитѣ на есперантскитѣ поети, тя дава духъ на есперантскитѣ конгреси, на есперантския животъ.

Ето, единъ българинъ отива въ чужда страна, изпада въ нещастие, и само у тѣзи, които сѫ приели тази идея, той намира хора, които му оказватъ съчувствие, подкрепа, утеха. За да не бѫда голословенъ, ще прочета въ български преводъ писмото на единъ урагвайски есперантистъ, отправено до председателя на Софийската Есперантска Секция по случай смъртьта на българския есперантистъ Иванъ Добревски, починалъ въ гр. Монтевидео (Урагвай). Това писмо илюстрова добре живота между есперантиститѣ, озаренъ отъ хубавата вѫтрешна идея на есперантизъма.

(Самото писмо е публикувано въ български преводъ въ в. „Зелена Звезда", год. I, бр. 8, Плѣвенъ, 1924 год.).

— — — — — — — — — — — — — — —

Коментарии сѫ излишни. Това писмо говори красноречиво за онзи хубавъ животъ, който привързва насъ, есперантиститѣ, тъй силно къмъ есперанто, който създава отъ всѣки единъ отъ насъ — отъ най-голѣмъ до най-малъкъ — борецъ за тържеството на есперанто.

Сега, следъ като изслушахте днешнитѣ речи за есперанто, макаръ и тѣ да дадоха една малка часть отъ това. което може да се каже за есперанто, макаръ тѣ да подигнаха само единия крайчецъ на завесата, която ви дѣли отъ есперантския животъ, вие все имате горе-долу една закрѫглена представа за сѫщината на есперанто.

Сега, следъ всичко чуто, на васъ остава да си отговорите на тѣзи два въпроса:

— *Ще бѫде ли по-добре за народитѣ, когато есперанто успѣе да се разпространи неимовѣрно и да улесни и умножи международнитѣ сношения?*

— *Ще бѫде ли по-добре за човѣчеството, когато животътъ, който днесъ цари между есперантиститѣ, стане всеобщъ животъ и въ неговия духъ се възпитаватъ иднитѣ поколения?*

И ако вие си отговорите положително на тѣзи въпроси, тогава ценете дейностьта на есперантиститѣ, радвайте се, като виждате, че все повече и повече хора отъ всички съсловия — отъ професора до работника — участвуватъ въ есперантското движение, и подкрепете есперантиститѣ въ тѣхната трудна, но славна борба.

Sciigoj — Известия.

De la Centra Komitato.

En la konsisto de la C. K. okazis ŝanĝoj. Samideano Ivan Dobrev, pro tio ke li eklogis en la provinco (Vratca), eksiĝis. Lian lokon devis okupi samideano Stefan Nenkov, kiu ricevis en la baloto plej multajn voĉojn post la elektitaj membroj de la C. K. Li pro personaj kaŭzoj (multa okupo) rifuzis akcepti la vakantan lokon, kaj ĝin akceptis la sekvanta laŭvice samideano Kiro Georgiev.

La prezidanto de la societo, Sinjoro G. Aktarĝiev, prezentis al la C. K. sian eksiĝon per la sekvanta letero de la 5. oktobro j. k., adresita al la vicprezidanto de la societo:

Georgo Aktarĝiev
Korespondanto de fremdaj gazetoj
Sofia, ulica „Isker" 27
Telefono: „Halite" 48.

Sofia, 5. de Oktobro, 1924.

Al Sinjoro Vicprezidanto
de la Bulgara Esperantista Societo
en Sofia.

Mi havas la honoron sciigi al vi kaj per vi al la estiminda Centra Komitato de la Bulgara Esperantista Societo, ke pro multe da laboro kaj pro manko de tempo mi plu ne povas okupi la honorplenan postenon de prezidanto de la menciita societo, nek plu esti membro de la Centra Komitato.

Tial mi kun granda bedaŭro petas vin, estimata sinjoro vicprezidanto, ke vi bonvolu prezenti al la Centra Komitato de la B. E. S. mian eksiĝon kiel prezidanto kaj kiel komitatano kaj insisti, ke ĝi estu akceptata, dirante al la komitato, ke en nenia okazo mi povas repreni tiun ĉi mian eksiĝan petskribon.

Uzante la bonan okazon, mi esprimas al vi kaj al ĉiuj membroj de la Komitato mian plej koran dankon por la subteno, kiun vi kaj ili ĉiam bonvolis doni al mi en la malfacila tasko gvidi la aferojn de nia kara Societo.

Kun korega samideana saluto mi restas, kara kaj tre estimata sinjoro vicprezidanto, ĉiam via

Georgo Aktarĝiev.

Al tio la Centra Komitato respondis per la sekvanta letero:

Bulgara Esperantista Societo
№ 32
10. Oktobro, 1924.

Al Sinjoro Georgi Aktarĝiev
Eksprezidanto kaj Honora Membro de B. E. S.

Tre estimata Sinjoro,

La Centra Komitato de la Bulgara Esperantista Societo kun granda bedaŭro akceptis vian eksiĝon.

Ni sentas nian devon danki vin por via ĝisnuna laboro, kaj ni forte esperas, ke via amo kaj sindonemo al nia afero, pruvitaj de vi multfoje, restos ĉiam samaj, kaj ke ni trovos vian samideanan apogon kaj helpon ĉiam, kiam ni eksentos bezonon de ili.

Volu akcepti, Kara Sinjoro, la esprimon de niaj koraj sentoj al vi.

p. Prezidanto: At. D. Atanasov.
Sekretario-kasisto: P. A. Kolev.

La C. K. invitis F-inon *Mara Zafirova* okupi la vakantan lokon en la C. K., sed ŝi pro multa okupateco rifuzis. La lokon okupis la sekvanta post ŝi samideano en la balota listo — *Asen Grigorov*.

— Sekve de tio, ke la membro de la Kontrola Komitato *Kiro Georgiev* eniris en la Centran Komitaton, lian lokon en la Kontrola Komitato akceptis la respektiva rezerva membro *Vasil Gaŝevski*.

— Устава на дружеството е утвърденъ отъ Мин. Вжтр. Работи и Нар. Здраве. № на заповѣдьта и на Държавенъ Вестникъ ще се оповести допълнително.

— Поради това, че пълното предаване имуществото отъ бившия секретарь-касиеръ на новия такъвъ бѣ забавено по независящи отъ тѣхъ причини доста много — има закъснение въ изпълнението на нѣкои поржчки и ненавременно отговаряне.

De la sekretario-kasisto.

— Поканватъ се всички групи и отдѣлни лица, които иматъ задължения къмъ дружествената каса, да побързатъ да уредятъ смѣткитѣ си. За въ бждаще, стойностьта на изпращани на кредитъ книги, членски карти и марки и др., ще трѣбва да се издължава въ най-скоро време. Всѣки левъ е отъ значение за дружествената дейность, а по настоящемъ централната каса има да прибира близо 20.000 лева.

— Веднага следъ изтичане на пропагандната седмица групитѣ да представятъ подробни сведения за извършеното и записанитѣ нови членове и абонати, продадени броеве отъ Bulgara Esperantisto и др.

— Желателно е, щото групитѣ и отдѣлнитѣ есперантисти, отговаряйки на запитвания и др. писма отъ дружеството, да упоменаватъ № на писмото, на което отговарятъ. Достатъчно е, да турятъ въ своето писмо: „*На №* . . .“.

De la redakcio.

— Абонатитѣ, при промѣна на адреса, да уведомяватъ своевременно, като посочатъ и предишното си мѣстожителство.

— При изпращане абонаменти, желателно е да се посочва, дали лицата сж стари или нови абонати и притежаватъ ли вече излѣзлитѣ броеве.

До ....
....
....

Diversaj.

— Ĉar nia samideano Iv. Ĝarov transloĝiĝis en Plovdiv (str. D-ro Ĉomakov, 11), ĉion rilatantan al Esp. grupo en Nevrokop oni sendu al ties sekretario — Kost. Gr. Markov.

— По случай „зелената седмица" ще излѣзе единственъ брой на в. „Есперанто" съ пропагандиченъ материялъ на български за неесперантисти. Умоляватъ се групитѣ да съобщятъ веднага, колко броеве ще могатъ да разпродадатъ. Порѫчкитѣ да се отправятъ до секретарь-касиера на Софийската секция Н. Ронковъ, ул. „Софроний" № 130, София.

— Karaj samideanoj, antaŭ kelkaj monatoj grupo da niaj samideanoj en Koblenz (Germanio), penetritaj de l'nobla ideo: proksimiĝo kaj koniĝo inter la esperantistoj, fondis esperantan kolektanto-klubon „Amikeco" por interŝanĝo leterojn, gazetojn, librojn, poŝtmarkojn kaj aliaĵojn. Ĝi havas membrojn preskaŭ el ĉiuj partoj de l'mondo.

Karaj samideanoj, subtenu tiun noblan agon aliĝante kaj ege ĝin propagandu inter viaj amikoj.

Ĉiu esperantisto devos esti membro de „Amikeco".

Ĉion, kio koncernas al „Amikeco", sendu al adreso: Vasil Ivanov, XII linia № 17, Varna.

Niaj mortintoj.

Esper. grupo „Frateco en Varna perdis dumsomere sian sincere fidelan kaj bonan samideanon kaj membron

GEORGI ST. NENOV,

30 jara, laboristo

mortinta 4a de Julio j. k. en vil. Zlatica — en Balkano, pro la sengraca kaj ĉiama laborista „flava gastino", — la ftizo, — for de nia kolegaro, kiu eĉ floreton ne metis sur lian tombon malproksiman, sed proksime en ĉies koro ekkuŝinta, kiel blanka floreto de frateco inter gefratoj-verdstelanoj.

Kondolencojn al liaj parencoj!

Eternan pacon al lia spirto!

La grupo — Varna.

REDAKCIA KOMITATO:

Dimitr Simeonov. — Zahari K. Zahariev. — Asen Grigorov. — Atanas D. Atanasov.

Adreso de la redakcio: Sofio (Bulgario), str. Vitoŝka, 48.

София. — Печатница Б. А. Кожухаровъ. — Телефонъ 1894.